# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de Ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**

**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale**



PLENUMITA 25/01/2024 sescentsepdekunua eldono (unua eldono 26/09/2011)



**Subtenu vian Novaĵleteron**

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

**La limdato por sendi kontribuaĵon al AE estas mardo en la vespero. Merkredo estas tro malfrua .**
Alternativaj Novaĵoj https://www.greanvillepost.com/ https://titaniclifeboatacademy.org/ https://globalsouth.co/

**Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj“ korektitaj atingeblas je la suba adreso**
Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo
Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA. (Sen #)

[redacted]

## Esperanta Retradio



DONAS BONAN CIRKAU-5 MINUTAN AUSKULTADON KAJ LEGADON ĈIUN TAGON

MODIFITA MIKROBIOMO IGAS PLANTOJN PLI REZISTIVAJ

20a de Januaro 2024 (*Roger Springer*)

# La Manlia Esperanto-Klubo



La Manlia grupo kunvenas je 10.30 atm ĝis 12ptm la unuan kaj trian sabatojn de la monato Unu taso da klubpagita kafo atendos vin. Ni renkontiĝas ĉe la oceana fronto kontraŭ la Restoracio Bluewater, Suda Stejno.




La 18a de Januaro estis la tria sabato.
Venis
Chris Holliss, John Casey, Ian Wylles Roger Springer kaj Rainer Kurz

02 9976 6320 *Roger Springer*


# Responde al la demandoj en la letero de Ueli Haenni AE-670.

Mia nomo estas Vere. Tio estas konfuza vorto por Esperantistoj. Mia nomo Vere ne estas Esperanto vorto eĉ kvankam ĝi havas la saman signifon. La alia konfuza afero estas ke oni elparolas ĝin laŭ la sono de la Esperanto vorto "via" sed la signifo de Vere kaj "via" ne estas la sama. Homoj demandas min de kie mia nomo venas kaj mi vere devas diri: el libro de nomoj por knaboj ĉar miaj gepatroj deziris ke iliaj infanoj havu malkomunajn nomojn. Tio estas neordinaraj nomoj tiel ke neniu krimulo povu havi la saman nomon.




Pri miaj fratinoj. Mi havas kvar fratinojn. Unu loĝas en Centra Marbordo apud Sidnejo, unu en *Woodend* kiu estas 71 kilometrojn nordokcidente de Melburno, unu en *Christchurch* NovZelando kaj unu en *Levin* NovZelando. Mi estas la plej maljuna el miaj gefratoj kaj mi atingis la sepdek kvaran jaron de mia vivo.

Kiam mi estis preta veturi oni avertis min ke la ŝoseo laŭ la maro estis sub akvo tial mi veturis pli interne de la lando laŭ *Hume* ŝoseo. Antaŭ monatoj mi jam elprovis mian taskon kiam mi veturis al Manlio motorbicikle kiel raportita 10/8/2023 en AE-647.



Mi metas ĉi tie mapon de mia raportita vojaĝo. La distanco estas 1837 km.

Sendita de *Vere Williams* kiu loĝas en Brisbano.

Kara esperantisto,

Hodiaŭ, marde (22/01/24) David Astle intervjuos min pri Esperanto ĉe ABC Radio Melbourne dum sia vespera programo "Evenings with David Astle" je la **21:30 VIC, NSW, TAS** 20:30 QLD 21:00 SA 20:00 NT 18:30 WA

Klaku sur la suba ligilo por aŭskulti ABC Radio Melbourne. ***ABC Radio Melbourne***

Bv informi ankaŭ kelkajn de viaj amikoj, telefonu la radiostacion post la intervjuo(se David proponas tion)



Dankon. Plej amike, *Sandor Horvath*

# Post kongresa tagmanĝo

Post la kongreso en *Ballarat* ni tagmanĝis ĉe la domo de Heather. La du vizitantoj, Hoan kaj Huyen el Vjetnamujo, Sandor kaj Helen el Adelajdo, Joanne kaj Peter kaj Karlo el Melburno. Ni ĝuis tre bongustan vjetnaman manĝaĵon danke al Huyen.

*Heather Heldzingen*





# 3ZZZ

La ĉefa temo de la radio elsendo de la 22a de januaro 2024 ŝanĝo: ŝanĝo en la kulturo en Malagasio, ŝanĝo en la uzo de la vorto “dividi”, ŝanĝo en la maniero kultivi la teron en Venezuelo.
Kaj ĉu ŝanĝo en la vivo de tradukistoj kaj interpretistoj pro la Artefarita Intelekto?

*Franciska Toubale*



Bela Helikonio floras nun en mia ĝardeno

*Peter Danzer*



